La infanoj, kiuj estis inter 11- kaj 15-jaraĝaj, mem elektis vortojn el vortaro por ilustrati. Ili uzis modloplaston por fari la bildojn de la vortoj.

La instruistino instruis kaj Esperanton kaj arton, do ŝi elektis la projekton por ekzercigi talenton kaj intereson en ambaŭ kampoj, kaj por krei instruilon



utilan por pli aĝaj lernantoj.

Instruistinoj Susan Chahwan de la Laŭ-Montessori-a Lernejo Sutherland en Sidneo kaj Carol Engmann de la Laŭ-Montessori-a Lernejo de Ĝakarto en Indonezio,



Natural v. artificial in language

The philosophy of language defines a natural language as “one which arises in an unpremeditated fashion as the result of the innate facility for language possessed by the human intellect”. This definition would appear to be particularly apposite in the case of, say, the unwritten languages of Amazon or New Guinea tribes. A more modern comparison is between ordinary languages such as English, French and Chinese – described as natural – and computer languages, such as Algol, Fortran and C, which are artificial constructions. Against this view, however, the New Zealand linguist Steven Roger Fischer states in his *History of Reading* (London, 2003) that national languages, such as English, are the artificial distillation of local dialects.

If we take the case of Italy, no unified Italian language existed before Dante. Even today, most Italians are said to prefer to communicate with their peers in their local dialects, not in what has been called *lingua toscana en bocca romana* “a Tuscan language in a Roman mouth”. Similarly, modern German (Hochdeutsch) is regarded as largely the product of Luther’s translation of the Bible. Even the actual names of individuals who created so-called national languages (modern Hebrew, Slovak, Hungarian, etc.) on the basis of regional dialects are known. An example of such an individual is Ivar Aasen (1813–96) who, in the middle of the nineteenth century, set out to create a national Norwegian language to replace the Danish or Dano-Norwegian used during the period when Norway was ruled by Denmark. (Something

similar to creating a national language for Scotland on the basis of various dialects has been attempted by Scottish writers such as Hugh MacDiarmid.) Eliezer Ben-Yehudah is regarded as the father of Modern Hebrew, which, although based on the ancient language of the Bible, might be considered to some extent artificial since so much of its modern vocabulary had to be invented or borrowed. Similarly, the Slovak language – once regarded as a dialect of Czech – exists in its present form due to the efforts of Ludovít Štúr (1815–56) and his group of Lutheran innovators. Further, Ferenc Kazinczy of Hungary may be seen as representative of those who made Hungarian into a language suitable for modern use.

It can be argued that the two forms of Norwegian now officially accepted are, in fact, artificial constructions, though based on natural spoken dialects.

Modern English clearly owes much to Shakespeare and to the Authorised version of the Bible. Further, much of English vocabulary (common names of flowers, butterflies, etc.) is the invention of individuals such as Nicholas Culpeper (1616–54). From more recent times one may quote the extensive – and increasingly internationalised – terminology of computing, most of which is the coinage of young computer technicians in such places as Silicon Valley, USA. A comparison is often made between so-called natural languages (English, German, etc.) and so-called artificial (or planned) languages, e.g. Esperanto, Ido. Yet both English and Esperanto are an amalgam of many languages, from which elements have been borrowed by scholars and writers, and a case could be made for considering the one to be no more (and no less) artificial than the other. Perhaps the languages of literate peoples cannot but be artificial constructions, just as writing is an artificial construction. Man in a state of nature does not write books. Only his speech is wholly natural.

Girvan McKay

Kipro – lando sen esperantistoj

La insulo Kipro ne havas esperantistojn – bedaŭrinda fakto por lando dividita inter grek- kaj turk-parolantoj. Kiel ofte okazas, ni supozas, ke la ĉi-sekvaj informoj temas sole pri la sudo, greklingva parto. Eble malprave, sed atingis nin la informo, ke aktiva itala esperantisto laboras en Kipro – familia nomo nekonata.

En junio Roberto sukcese aperigis artikolon en la greklingva kipro gazeto *I fonì tis Lemesù*.

Li petas, ke oni skribu al la retadreso de la gazeto (diadromes.ekd@hotmail.com) ne simple dankojn kaj mallongajn gratulojn, sed koncize rakontu kiel Esperanto helpis al vi en la vivo, al viaj amikoj, priskribu rakontojn pri Esperanto-renkontiĝoj – kion ili donas al ni, esperantistoj, kiel Esperanto helpas lerni aliajn lingvojn, pri feliĉo koni kaj uzi Esperanton kaj simile.

Se vi ne scipovas la grekan, eblas skribi en Esperanto, sed prefere skribu angle. Viaj leteroj helpas al Roberto, kiu eble ricevos peton daŭrigi rakontojn pri Esperanto al la kipro publiko.

Se vi skribos, via letero kaj nomo aperos en la belega, legenda, antikva kaj fabela Kipro, lulilo de la eŭropa kulturo.

Eŭropa Kongreso en Galivo, Irlando

La 9a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos de la 16a ĝis la 20a de julio 2012 en la okcident-irlanda urbo Galivo (Gaillimh/Galway). Jam aperis kolora faldfolio kun unuaj informoj pri la kongreso, kaj paĝaro kun informoj kaj ebleco aliĝi ĉe <http://eeu-kongreso.webnode.com>. Aperis ankaŭ belaj reklamafiŝoj je formato B2, kiujn oni povas mendi ĉe Maja Tiŝljar ([maja.tisljar ĉe gmail.com](mailto:maja.tisljar@gmail.com)). Aliĝo antaŭ la fino de 2011 estos avantaĝa.

Io tute nova

Ĉi-foje oni provis ion tute novan. La Loka Kongresa Komitato (LKK) estas personoj el profesia neesperantista teamo de la Galiva entrepreno, kiu havas bonajn kontaktojn ne nur kun la urba administracio, sed ankaŭ kun ĉiuj lokaj instancoj, kiuj gravas por la kongreso kaj povas pli bone ol amatoroj ricevi diversajn rabatojn, subvenciojn, elekti hotelojn, organizi allogajn kulturprogramojn kaj turismajn vizitojn.

La kompletan administracion kun la esperantistoj inkluzive la financojn prizorgos nia amatora teamo, kies kunordiganto estos Seán Ó Riain kaj kunordiganto kun LKK kaj la plenumdirektoro Maja Tiŝljar. Renkontinte kaj Sean kaj Maja en Kopenhago, mi scias, ke ĝis nun tiu kunlaboro bone funkcias.

'Lerni pli, kosti malpli'

La programo grandparte jam estas preta. Kadre de la ĉeftemo 'Lingvolernado en EU: Lerni pli, kosti malpli' okazos aparta konferenco, dediĉita al prope-deŭtika signifo de lernado de Esperanto kaj kelkaj prelegoj pri lerneja lernado de lingvoj. Inter

ili ankaŭ troviĝos prelego pri fremdlingva lernado en irlandaj lernejoj, kie oni ne nur havas problemon pri fremda lingvo – ekzemple la franca, sed ankaŭ pri sia propra dua lingvo – la irlanda.

Kelkaj fakaj organizaĵoj havos siajn prelegojn kaj kunvenojn kiel la juristoj, verduloj, Asocio por Eŭropa Konscio ktp.

Kompreneble ankaŭ la kultura programo riĉos. En la bunta programo estos nacia vespero, koncertoj de irlandanoj kaj Esperanto-grupoj, teatraĵoj (Selter-scenejo el Serbio, Jerzy Handzlik el Pollando) kaj tradiciaj eroj kiel solena malfermo kaj konkluda ferma kun-sido.

Estos antaŭkongreso al Dublino kaj postkongreso al insuloj ĉirkaŭ Galivo. Pri tio oni povas informiĝi ĉe www.europpo.eu, kie troviĝas informoj ankaŭ pri aliĝado kaj pagmaniero.

Hilary Chapman

RETE KAJ LETERE

Laboro de la Afrikaj Komisiono kaj Oficejo – kaj helpo al afrikaj virinoj esperantistaj

Karaj geesperantistoj afrikaj kaj eksterafrikaj,

Nome de la Afrika Komisiono de UEA (AK), mi skribas tiun ĉi mesaĝon, por atentigi vin pri niaj agadoj kaj pri la neceso, ke vi plu subtenu niajn laborojn per donacoj al la Afrika Fondaĵo ĉe UEA (laŭ la kutimaj pagmanieroj indikitaj en la Jarlibro [*ekzemple, pere de EAB*]).

Kiel vi sendube povis noti, ekde la pasinta februaro, la agadoj de AK evoluas en kontentiga maniero. Ni ankaŭ per financa helpo de ILEI sukcesis aranĝi seminariojn en Kinŝaso, Kongo kaj en Rumonge, Burundo, por estontaj instruistoj de Esperanto. Ni dissendis instruilojn al unuopulaj esperantistoj, grupoj kaj asocioj en Benino, Sudafriko, Ugando ktp. Ni mem produktis informilojn, kiuj estis disdonitaj dum la Kopenhaga UK.

Kiel unu el la gvidaj ideoj de nia Komisiono, ni priatentas landajn asociojn kaj grupojn, liverante al ili niajn simplajn lernilojn kaj informilojn. Krom perkorespondaj kursoj, okazas ĉeestaj kursoj en Burundo, Togo-

BY E-MAIL AND LETTER

lando, Sudafriko sub gvido de komisionanoj kaj en multegaj aliaj afrikaj landoj kun lokaj gvidantoj. Ni atentigas pri la bezono por ĉiu landa asocio afrika provizi sin per informiloj, kaj ni eĉ pretas helpi en la kompostada laboro. Afrika Komisiono pere de la Afrika Oficejo kreis kaj plu kreas ret-paĝaron al landaj asocioj kaj grupoj, se ili liveras la materialon. La edukado estas ĉiam granda zorgo de AKanoj, kaj ni konsilas afrikanojn uzi retajn Esperanto-kursojn en nia paĝaro ĉe www.afriko-esperanto.org. Mallonge, ni provas en ĉiuj kampoj teni viglajn landajn grupojn kaj asociojn en Afriko. Ni alvokas al vi ĉiuj, ĉefe al eksterafrikanoj, por ke vi sendu librojn al Afriko.

La realigado de tiuj ĉi niaj planoj kostas monon, kaj ni petas vin, denove bonvoli plialtigi viajn donacojn al nia Komisiono.

Ĉar ni opinias, ke virinoj en la afrika movado devus esti pli atentataj, kiel komunan projekton ni ankaŭ subtenas seminarion de virinoj en DR Kongolando venontjare. Certe multaj el vi jam legis pri tio en diversaj listoj. Tamen ni ŝatus refoje memori, ke ĉiuj kon-

tribuoj tiukadre estas bonvenaj ĉe la sama Afrika Fondajo kun la indiko 'Virina seminario'.

Ni ne malpli dankas por viaj diversaj subtenoj al la Afrika Komisiono.

La Kunordiganto:
ADJÉ Adjévi
06 BP.61807, Lomé,
Togolando.
Tel.: +228 9257549
Retpoŝto: adjevia@yahoo.fr



• **Silvestrumu ĉe la 28a Internacia Festivalo en Xanten!**

Karaj geamikoj,
Koran bonvenon al la 28a Internacia Festivalo en Xanten! Ĝoju pri etosoplena aranĝo kaj altkvalita programo!
Xanten (pron: Ksánten) situas inter la germana Duisburg kaj la

nederlanda Nijmegen, ĉirkaŭ 50 kilometrojn de ambaŭ urboj. Komforta domo kun belaj salonoj kaj etosoplena trinkejo (nia ŝatata 'Knajpo') proponas al vi agrablan tutsemajnan restadon. Ĉiuj ĉambroj disponas pri duŝejo kaj necesejo. La domo estis renovigita (kaj pligrandigita) en 2010.

La urbeto Xanten estas konata pro la Arkeologia Parko (APX) kun rekonstruoj el la romia epoko. Imponas la majesta katedralo S-ta Viktor, origine romanika, sed gotika rekonstruo el la 13a jarcento, la plej granda inter Kolonjo kaj Norda Maro.

Niaj kotizoj inkluzivas tri manĝojn tage, la loĝigon kaj la tradiciajn silvestrajn bufedon, balon kaj novjaron 'brunĉon'.

Ni preparas interesan programon: prelegoj, kursoj, promenoj ... Ni antaŭvidas variajn distrajn ofertojn por la vesperoj. En nia nunjara kadra temo ni prezentas al vi Benelukson.

Kadre okazos la 5a Internacia Vintra Universitato. En nia tuttaga ekskurso ni vizitas la najbaran Nijmegen (pron: Nejme:he)/, la plej malnovan urbon en Nederlando.

Vizitu niajn interretajn paĝojn, legu aktualajn informojn kaj rigardu fotoalbumojn: www.internacia-festivalo.de.

Bonvenon al vi, festu novjare kun ni, ĝuu nian etoson.

Hans-Dieter Platz
(organizanto)
Retpoŝto: HDP@internacia-festivalo.de



Interesaj retpaĝoj – helpo petata

Saluton karaj samideanoj,

En la pasinta semajno du interesaj novaj retpaĝoj estis kreitaj.

La unua retpaĝo havas multajn utilajn ligojn al bonaj Esperanto-retpaĝoj. Temas pri

LEGEKZERCO

READING PRACTICE

La problemo de la libertempo

La edukado povas certigi al ĉiu homo la maksimumon de mensa evoluigo. Sed ĉu en la plimulto de kazoj tiu maksimumo estas sufiĉe alta por ebligi al tuta socio libertempadi sen disvolvi tiujn malaprobindajn trajtojn, kiuj ĉiam karakterizis la klasojn libertempahavajn? Mi konas abunde da homoj, kiuj ricevis la plej bone troveblan edukon de la nuna epoko kaj uzas sian libertempon kvazaŭ ili neniam ajn estus edukitaj. Tamen konfesindas, ke nia plej bona edukado estas malbona (kvankam sufiĉe bona por ĉiuj tiuj talentuloj kaj geniuloj, kiujn ni posedas); eble kiam oni sukcesos fari ĝin tute efika, tiuj homoj pasigos sian libertempon kontemplanter la naturleĝojn. Eble. Mi emas dubi tion.

H.G. Wells, kiu kredas je la potenco de la edukado, transmetas sian Utopion je tri mil jaroj en la estontecon; George Bernard Shaw, malpli optimisme fidante al la naturo kaj la procezo de koscia evoluigo, transmetas sian al la jaro 30 000 p.K.. Se paroli geologie, tiuj tempodaŭroj estas ĉiucele egalaj laŭ sia mallongeco. Bedaŭrinde, tamen, ni ne estas fosilioj, sed homoj. Eĉ tri mil jaroj ŝajnas, en niaj okuloj, nekutime longa tempo. La penso, ke tri mil aŭ tridek mil jarojn de ĉi tie, homoj eble, imageble, vivos belan kaj racian ekzistadon estas nur milde konsola kaj malforte subtena. La homoj kutimas pensi sole pri si mem, siaj infanoj kaj la infanoj de siaj infanoj. Kaj ili tute pravas. Tri mil jarojn de nun, ĉio eble estos en ordo. Sed intertempe tiu malbona geologia kvaronhoro, kiu apartigas la nuntempon disde tiu rozkolora estonteco, estas travivenda. Kaj mi antaŭvidas, ke unu el la malpli gravaj, aŭ eĉ pli gravaj problemoj de tiu kvaronhoro estos la problemo de la libertempo. Ĝis la jaro du mil la seshora labortago estos ĉie la regulo, kaj la venonta cento da jaroj verŝajne vidos la maksimumon reduktita ĝis kvin aŭ eĉ malpli. La naturo, ĝis tiam, ne jam havos tempon por ŝanĝi la mensajn kutimojn de la raso; kaj edukado, kvankam plibonigita, nur ŝanĝos hundojn en trejnatajn hundojn. Kiel la viroj kaj virinoj plenigos sian ĉiam ampleksiĝantan libertempon? Ĉu per kontemplado de la naturleĝoj, kiel Henri Poincaré? Aŭ ĉu per legado de *News of the World*? Mi scivolas.

Tradukita el 'Laboro kaj libertempo' en *Laŭ la vojo – Notoj kaj eseoj de turisto* de Aldous Huxley. Londono, 1925.

filmoj, novaĵoj, podkastoĵoj, e-libroj ktp. Vi trovas la retpaĝon ĉe www.scoop.it/t/esperanto-lingvo-de-la-mondo.

La dua retpaĝo estas por lernantoj (kaj komencintoj). Ĝi havas diversajn ilojn por lerni Esperanton: vortarojn, filmkursojn, bonajn retpaĝajn kursojn ktp. Vi trovas tiun retpaĝon ĉe www.scoop.it/t/esperanto-lernu-la-lingvon-de-la-mondo.

Nun ni volas peti vian helpon.

1) Ĉu vi volas inspekti la retpaĝojn, kaj se vi havas bonajn aldonojn, bonvolu sendi ilin al ni (douwe@esperanto-jongeren.nl).

2) Se vi ŝatas la retpaĝojn kaj opinias, ke ili estas utilaj, bonvolu dissendi informojn pri la ligiloj al:

a) Viaj membroj (eble anoncu en loka gazeto)

b) Al la junula organizaĵo en via lando

c) Anoncu ĝin al *Facebook*-grupoj, forumoj, kiujn vi havas kaj konas

ĉ) Faru ligilojn de via retpaĝo al la novaj retpaĝoj (speciale interese por lernantoj kaj homoj, kiuj volas praktiki Esperanton)

Ni jam aŭdis, ke multaj homoj opinias, ke la retpaĝoj estas ege uzeblaj, kaj ni esperas, ke multaj homoj povas spekti, uzi kaj ĝui la retpaĝojn kun via helpo. Ju pli da homoj vidos kaj helpos, des pli bone la paĝaroj povos estiĝi.

Douwe Beerda
Nederlanda Esperanto-Junularo;
www.esperanto-jongeren.nl



• Preminflui ankaŭ Esperante?

Estimataj,

AVAAZ, kies nomo signifas 'voĉoj' en la lingvoj hindia kaj persa, kaj 'sono' en la urdua, estas tutmonda retmovado, kiu havigas rimedojn al la civitanoj por preminflui tutmondajn

politikajn decidojn. Bedaŭrinde, artikolo ankoraŭ ne troviĝas en Vikipedio pri tiu kreskanta movado, kies membronombro laŭdire superas 9,7 milionojn en 193 landoj. Materiala bazo tamen ekzistas en WikiTrans <<http://epo.wikitrans.net/Avaaz.org?eng=Avaaz.org>> por redakti artikolon, post lingva kaj enhava kontrolo, kaj post komparo kun alilingvaj versioj.

La dekkvinlingva retejo de AVAAZ ankoraŭ ne havas Esperanto-version, kvankam la afero estis plurfoje proponita. Certe necesus, ke formiĝu skipo por regule provizi ties retejon per tradukoj; ne temas pri nura traduko de interfacio sed pri konstanta laboro. [La angla versio troviĝas sub www.avaaz.org/en.]

Henri Masson, Francio

EAB Update *online*

Did you know that *EAB Update* is available online? Not only can you read previous editions at <http://esperanto-gb.org/eab/update.htm> but you can also find the latest issue there too. So why not consider reading *Update* in its electronic format? After all, many photos are in full colour and you can simply copy and paste any internet links straight into your browser. No more fiddling around trying to copy lengthy addresses only to find an error because you've missed a squiggle somewhere! Plus the paper you save will be doing something positive for the environment. (You will, of course, receive inserts electronically, in the same manner.)

Most importantly, though, is what it would mean for the Association financially. The cost of printing and posting four issues of *EAB Update* last year was £4,409, which worked out at around £11 per subscriber. *La Brita Esperantisto*, which goes to fewer people, cost £1,745, equivalent to about £5.20 of the subscription cost. This means that over £16 of your subscription (£25 standard, £20 reduced) goes purely on printing and posting the periodicals. That's 64% for the people who pay the full rate, and a colossal 80% for those on the reduced tariff! Whilst we all love to receive our periodicals and read the latest news and articles, doing so online rather than on paper means that a much greater proportion of our membership subscriptions can go towards promoting Esperanto.

The system works simply. If at any time you wish to opt out of receiving the printed version, just e-mail Viv in the office at eab@esperanto-gb.org. She will then send you an e-mail when future issues of *EAB Update* are released, which will contain a link to the current issue and a password to access it. Any leaflets, nomination forms and other information that is normally enclosed within will also be available for easy download. You'll receive your e-mail at the same time that other people are receiving their printed copies, so you won't miss out on a thing.

Of course, reading on a computer screen is an acquired taste and will not be suitable for everyone. But for those of us who already choose to receive magazines such as *Esperanto*, *Monato* and *Kontakto* in electronic format, it is worth giving serious consideration to receiving *EAB Update* electronically too. Remember, if you don't like it, you can always go back to using the printed version!

Kune ni estas pli fortaj

UEA-kotizoj por 2012

Kerna servo de UEA estas organizi la ĉiujaran **Universalan Kongreson de Esperanto** (UK) tra la mondo, je kies kotizo individua membro ricevas *rabaton*. UEA funkciigas ankaŭ la plej grandan libroservon de Esperantaj libroj (pli ol 4 000 diversaj libroj kaj varoj). Plena katalogo kaj rekta mendebleco ĉe ttt-paĝaro www.uea.org/katalogo. Individua ano de UEA rajtas mendi ĉe la **Libroservo de UEA** kun **rabato de 10%**! (Membro kun Gvidlibro aŭ Jarlibro ricevas la rabaton por du mendoj jare, aliaj por ĉiu mendo.) Plej grave, UEA agadas por Esperanto sur la monda scenejo. Por pli detalaj informoj, oni konsultu la **Jarlibron de UEA** kaj la **revuon Esperanto**, kiujn ricevas individua membro.

Fariĝi individua membro de UEA

Eblas pagi por individua membreco rekte al UEA per kreditkarto (Visa, Eurocard, Mastercard, Access aŭ American Express), al nederlanda poŝtgira konto 37 89 64 (Den Haag) aŭ al la banko Bank Mees Pierson, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam, Nederlando (konto 25.52.89.804).

Alternative, oni povas pagi al la brita Peranto de UEA, kiu akceptas britan ĉekon aŭ poŝtmandaton kondiĉe ke ĉi tiu estas skribita al 'EAB', kio ebligas pagi ankaŭ kotizon al EAB samtempe: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; retadreso: eab@esperanto-gb.org. (Oni ne sendu britan ĉekon rekte al UEA.)

En la okazo se vi estas **nova membro**, bonvolu doni viajn plenajn nomon, adreson kaj, se vi havas **29 aŭ malpli da jaroj**, ankaŭ vian naskiĝaron*. Ĉiuokaze bonvolu klare indiki la celon de la pago. Por aniĝi oni ne postulas plenigon de oficiala formularo.



Kotizoj de UEA por 2011

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado £8
MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago) £21
MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) + *Esperanto* 11-foje ... £52
SA/Simpla abonanto al la revuo *Esperanto* sen membreco £33
Kto/Abono al la revuo *Kontakto* 6-foje, sen membreco £20
SZ/Societo Zamenhof: aldona, mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon £104

Servoj: Kongresaj aliĝoj kaj aliaj pagoj

La Peranto (EAB) povas akcepti pagojn per debetkarto (prefere ol per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA, por kiuj celoj la administreto de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

Aliĝu frue al la UK en Hanojo, Vjetnamio, por ricevi **maksimuman rabaton**: €160 antaŭ la 31a de decembro por anoj de UEA, sed €200 por nemembroj.

☆ **Universala Esperanto-Asocio**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Tel. 00-31-10-436-1044; fakse: 00-31-10-436-1751; rete: uea@co.uea.org; sekretario@co.uea.org; financoj@co.uea.org; kongresoj@co.uea.org; uk.mendoj@co.uea.org; libroservo@co.uea.org; ttt-paĝaro: www.uea.org

- **Esperanto in the press**

On 13 July a long article appeared in the North Wales *Daily Post*, arranged by Hilary Chapman and Neil Conroy. There was also a short piece in the *Liverpool Daily Post*, and in *The Yorkshire Evening Post* on the following day. A 'not very serious' piece appeared in *The Daily Mail*. The World Congress in Copenhagen served well as a hook for both local and regional journalists, often adding their own fantasies and prejudices.

- **Esperanto ĉe fondkongreso de asocio por liberpensado**

La 10an de aŭgusto okazis la fonda kongreso de la Internacia Asocio de la Libera Penso en Oslo, Norvegio. La organizanto estis la Internacia Komitato de Kunligo de la Ateistoj kaj Liberpensuloj (CILALP), kies multlingva retejo inkluzivas Esperanton. Ĉeestis la respondeculo de la Esperanto-Komisiono de CILALP, Dominique Simeone <dominique.simeone@laposte.net>.

- **ILEI en orienta Azio**

Post sia 44a konferenco en la Universitato de Kopenhago, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) tuj aktivigis en orienta Azio. En aŭgusto – iniciate de la ĉina, japana kaj korea sekcioj – la 1a ILEI-Seminario en Orienta Azio okazis en la Fremdlingva Universitato de Tianjin, Ĉinio, kun pli ol 70 partoprenantoj el Koreio, Japanio, Mongolio, Brazilo kaj Ĉinio, el kiuj pli ol 30 gejunulaj.

- **Prelego "La tutmonda angla: mito aŭ realaĵo?" prezentita ĉe Alliance Française**

Troveblas ĉe <www.ipernity.com/blog/32119/340553> Esperanta traduko de franclingva prelego, kiun faris prof. Robert Phillipson sub la titolo "L'anglais global : mythe ou réalité ?" dum kolokvo okazinta en Parizo, en la sidejo de Alliance Française (Franca

Alianco) la 20an de julio. La temo estis "La franca kaj la kresko de evoluintaj landoj".

Kompletigas la prelegon grafikajo pri la evoluado de elekto de redaktolingvoj en EU, 1970 ĝis 2009 <<http://www.ipernity.com/doc/32119/11186877>>, kiu okulfrappe montras

Kunlaboru kun Biblioteko Butler!

Eble vi scias, ke pasis preskaŭ naŭ jaroj de kiam nia Biblioteko alvenis al Barlaston. Dum tiu iom longa tempo ni laboradis por ordigi, katalogi kaj kompletigi la kolekton. Nun restas multe da kataloga laboro farenda, sed cetere la tasko sufiĉe progresis, por ke ni povu transiri al pli interesa stadio.

Por komenci, de nun ni volas dialogi kun legemuloj ne nur en Britio, sed ja el kiu ajn lando, por plibonigi nian programon de libroakirado. Ne nur pri libroj temas, kompreneble, sed ankaŭ pri kodiskoj (KD) kaj DVDiskoj, eroj el la interreto, fakte ĉio, kio povas aparteni al biblioteka kolekto.

De kelkaj jaroj ni klopodas por rekapti kelkajn erojn, kiujn ni maltrafis en la 'ekzilaj' jaroj de nia biblioteko, kiam la asocio estis en provizora oficejo en Ipswich, kaj la biblioteko estis en vartenejo. Dum tiu tempo ni ricevis preskaŭ nenion, kaj nun

la danĝeron de monopoligo de la tutmonda lingva komunikado per lingvo unuavice nacia.

- **Internet survey on Esperanto**

A Polish student needs Esperantists to fill in her survey on Esperanto and the internet at <http://w9gfo.webd.pl/>.

ni provas forigi la mankojn. Dum la priaj esploroj evidentiĝis, ke ankaŭ pli frue ni maltrafis interesajojn, do nun ankaŭ tiujn ni postĉasas.

Ni nun proksimiĝas al la fino de tiu laboro; do ni estos pli liberaj por akcepti proponojn, sugestojn, ideojn pri eroj, kiuj devus esti en la biblioteko, kaj pri agadoj, kiujn la biblioteko povus utile aldoni al sia repertuaro. Se vi havas ion tian en la kapo, ne tenu ĝin nur tie, sed sciigu ĝin al ni, ĉu per mesaĝo al la bibliotekisto, ĉu per komento en la tre interesaj ret-paĝoj de la biblioteko.

Kelkaj utilaj ligoj:

- Pri la biblioteko (kaj multaj aliaj aferoj) ĝenerale: <<http://biblbut.wordpress.com/>>
- Libroj k.a. lastatempe akiritaj: <<http://biblbut.wordpress.com/kio-estas-kie/pri-la-biblioteko/novaj-libroj/>>
- Libroj k.a. baldaŭ mendotaj: <<http://biblbut.wordpress.com/kio-estas-kie/pri-la-biblioteko/nimendos/>>

Viaj komentoj, rekomendoj kaj malrekomendoj estos tre bonvenaj.

Geoffrey King

Y Wedding bells! Y

Clare and I would like to send our congratulations to Penny Nicholas, who married Sam Bryant (himself having attended a weekend at Barlaston, British Congress at Llandudno and a JEB camping trip) on 17 September. They're a smashing couple whose company we've enjoyed on several occasions, and we wish them every happiness in their lives going forward.

Tim Owen

Kaj multajn bondezirojn de ĉiuj legantoj! Redaktoro.

- **Helpful article in *The Modernist***

A long and highly informative piece, "Esperanto: a language for all", by an independent journalist, appeared in the new magazine *The Modernist*, launched in Manchester on 23 June (see www.creativetimes.co.uk/events/the-modernist-magazine-launch).

- **Libroj por vjetnamoj**

Monkolekto por 'Libroj por Vjetnamio' okazis post la Solena Fermo de la ĵusa Universala Kongreso en Kopenhago. Pasintjare UEA faris la kampanjon 'Libroj por Kubo'. Per la kolektita mono ĉiuj kubaj kongresanoj ricevis kuponon, per kiu aĉeti librojn, KDojn ks. en la Libro-servo de UEA ĉe la UK. Por la kongreso en Hanojo, UEA denove kampanjas tiel. Per la jama kolektado ĉe la elirejo de Salono Zamenhof, oni atingis sumon de ĉirkaŭ 1 600 eŭroj. La kampanjo daŭros ĝis la UK en Hanojo.

- **Akademia konsultejo**

Ĉu vi scias pri la servo 'Konsultejo' de Akademio de Esperanto? Kiu ajn, kiu havas problemon pri vorto, pri faka termino, pri nova radiko por nova aĵo aŭ ideo, rajtas iri al la paĝaro de la Akademio (www.akademio-de-esperanto.org/konsultejo/index) kaj registri tie sian demandon. Alia vojo estas sendi mesaĝon al la retadreso konsultejo@akademio-de-esperanto.org, dum ankoraŭ alia vojo estas skribi al la direktoro de la sekcio leteron: Alexander Shlafer, 1017 North-oak Drive, Walnut Creek, CA 94598, Usono.

- **Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato kiel e-libro**

Tiu populara sciencfikcia romano de la fama usona romanisto Harry Harrison – mem multjara subtenanto de Esperanto – estas senpage elŝutebla en Esperanto ĉe <http://esperanto.org/Ondo/Libroj/php>, kie troviĝas ankoraŭ sep libroj en du e-formatoj. □

Alvoko al grupoj okaze de 'The Language Show'

Mi nomiĝas Marteno Miniĥ kaj ĉi-jare mi kunordigas la ĉeeston de Esperanto-Asocio de Britio en The Language Show, granda prilingva ekspozicio, kiu okazos ekde la 21a ĝis la 23a de oktobro 2011 (vendredo ĝis dimanĉo) en Londono.

Dum tiu ekspozicio, venas al nia budo multaj homoj el diversaj regionoj de Britio, kaj foje demandas pri lokaj Esperantaj kluboj kaj grupoj. Tiam estus bone, se ni havus informilojn aŭ informojn el diversaj regionoj, por povi doni al ili.

Se via klubo havas tiaspecan informilon (flugfolion/faldfolion), kiun ĝi uzas ĉe lokaj/regionaj aranĝoj por varbadi kaj

informadi, estus tre bone se vi povus sendi ĝin al mi.

Vi povas sendi paperpoŝte (ĉirkaŭ 5–8 ekzemplerojn) al mia adreso: Marteno Miniĥ, 43 Denzil Road, Willesden, London NW10 2UR aŭ retroŝte al: marteno@ikso.net.

Se vi tian informilon ne havas, estus tre bone, se vi povus krei tian, almenaŭ simplan porokazan nigra-blankan, kun bazaj informoj (tempo kaj loko de regulaj kunvenoj; kontaktinformoj al la loka grupo; retpaĝo/retpoŝt-adreso aŭ simile). Se vi eĉ tian simplan informilon ne havas, eble vi povus nur tiujn bazajn informojn retroŝte sendi al mi, por ke ni povu pludoni ilin al interesigantoj. Se vi estos dum la 21a ĝis la 23a de oktobro en Londono, ni ĝojos, se vi venos al nia budo n-ro 601 en la ekspozicia centro Olympia, National Hall. Mi deziras multan sukceson al la agado de via loka grupo kaj ĝojas al estonta kontakto.

Marteno Miniĥ

Orienta Federacio gvidita tra Lavenham

Je la 11a de aŭgusto membroj de la Orienta Federacio partoprenis en promenado ĉirkaŭ la historia urbo Lavenham en Suffolk. Gvidis la rondiron Ben Gosling (*tria de maldekstre en la suba foto*), kiu poste afable invitis al sia ĝardeno por babilado kaj kukoj.



SLEG promenis tra Krojdono

Esperanto-parolantoj de lokoj tiel malproksimaj kiel Hastingo kaj Nordhamptono aliĝis kun membroj de la Sud-Londona Esperanto-Grupo por viziti Krojdonon je la 11a de junio.

Post tagmanĝo kaj babilado en urbocentra trinkejo, ni ekiris vidi kelkajn historiajn konstruaĵojn. La verkinto gvidis en Esperanto.

Nia promonado komenciĝis ekster la Hospitalo de la Sankta Triunuo, almozdomaro fondita de John Whitgift, ĉefepiskopo de Kanterburio, en 1596. De tie ni promenis al la paroĥa preĝejo. Origine mezepoka, ĝi estis rekonstruita post incendio en 1867. Ĉi-jare oni rangaltigis ĝin al 'ĉefpreĝejo' (angle *minster*). Apud la preĝejo ni vidis la Malnovan Palacon, antaŭan loĝejon de la ĉefepiskopoj de Kanterburio.

Revenante al la urbocentro, ni paŭzis ĉe la malnova akvo-provizejo, kaj rigardis pumpil-

New Members of EAB

Gregor Benton, Llantwit Major
Paul Dennett, Halifax
Steven Flood, Barking
Ronald Green, Rossendale
Kieron Hoswell, Stafford
Richard Howard, Northampton
David Howes, Great Totham
Jim Lawson, Burnley

New Supporter

Robert Worley, Horsham

Deceased members

Jack Casey, Glasgow
Jean Humphreys, Swansea
James Milton Mathias, Weston-Super-Mare

CONGRATULATIONS

Completed the *Elementary!* course

Carol Bunting, Basingstoke

Completed the *Accelerated* course

Audrey Deal, Dagenham



Supre: de maldekstre, Richard Howard, Mikaelo Sims, Alison Williams, Gregory Porilo kaj Mike Wade staras antaŭ la Hospitalo de la Sankta Triunuo.

Dekstre: de maldekstre, Mike Wade, Raymond Butler, Richard Howard kaj Mikaelo Sims staras ekster la urbodomo.



domon, kiu antaŭe apartenis al 'atmosfera' fervojo. Alveninte al la urbodomo, ni admiris la horloĝturon kaj la reliefojn sur la muroj de la biblioteko.

Post paŭzo por trinki ni vizitis la urban muzeon.

Raymond Butler

Nordokcidente

La Nord-Okcidenta Federacio okazigis sian tradician Aŭtunan Kunvenon je la 8a de oktobro en Chester, kie, interalie, Hilary Chapman prelegis pri 'Vojaĝoj per Esperanto'.

Nekrologo

La 11an de aŭgusto 2011 Jack Casey, tre ŝatata kaj alte estimata ano de Esperanto-Asocio de Skotlando, dum multaj jaroj sekretario de la Glasgova Esperanto-Societo kaj delegito de UEA, forpasis post longa malsano. Li estis 80-jaraĝa.

Jack estis tre inspira ano de la movado en Skotlando. Lia ĉiama pozitiva kaj kuraĝiga sinteno dum ĉiuj el niaj kongresoj, studrondoj, kaj klubaj kunvenoj dissendis ĝojigan lumon al ĉiuj, kiuj estis en lia apudeco. Li estis preta konversacii kun ĉiuj, kaj li nepre parolis inteligente kaj bone informite pri vasta gamo de temoj. Tia sinteno markis ankaŭ lian profesion kaj familian vivon.

Signo de lia bonhumuro aŭdiĝis en tio, ke la de li elektita bonveniga muziko por liaj funebrantoj estis ĉerpajoj el lia ege ŝatata ĵazmuziko, kaj en la 'himno', kiun ni ĉiuj kantis, la glasgov-eciga amuzkanto "The Jeely Piece Song".

Hju Rid

BARLASTONO *bis!*

Dek unu elstaraj prelegoj el la 1980aj kaj '90aj jaroj en DVD-prezento nur po £3,90



Sampreze haveblas ankaŭ DVD kun 4 filmetoj pri Esperanto-agado en Barlastono (22 + 20 + 16 + 9 = 67 minutoj).

Je aĉeto de ĉiuj 12 diskoj samtempe (£46,80), vi ricevos *senpage* 2 kromajn diskojn (normale £7 kune) pri la Brita Kongreso de 1989 en Stoke-on-Trent. Aldonu 20%ojn por sendokostoj (minimume £1,50).

Ivo Lapenna

La solidariga rolo de Esperanto 1985 (74 min.)

Marjorie Boulton

Esperanto: ĉu lingvo eŭropa por la tuta mondo? 1992 (75 min.)

Jorge Camacho

Ĉu verki aŭ ne verki Esperante?; La tekstoj de rokmuzika grupo en Esperanto 1993 (ambaŭ po 62 min.)

Gerrit Berveling

Esperanto-literaturo; Tradukado de literaturaj tekstoj kaj kompara literaturscienco 1994 (77 kaj 84 min.)

Leo Vulfoviĉ

Naciista movado en Sovetunio 1995 (83 min.)

Don Lord

Nekonataj faktoj pri Esperanto 1995 (48 min.)

Marjorie Boulton

La procezo, la sorĉistino kaj ŝia kato 1996 (71 min.)

Renato Corsetti

Unulingveco estas kuracebla 1996 (72 min.)

William Auld

Esperanto: proleta lingvo 1997 (43 min.), kun ero el *La kulturbazo historia de la Esperanto-movado* (1985) (7 min.)

Second-hand books available from the office

• Prices include postage & packing at cost.

Antaŭ la kulisoj Bernard Golden. Dek du unuaktaj teatraĵoj, premiitaj. Marjorie Boulton skribis: "Jen kolekto kiu certe kaŭzos ridojn." Hungario: 1994. Broŝ., 187p. £3.50

Ĉu vi konas la teron? Endre Dudich. Pri geologio-terscienco kun multaj klarigaj diagramoj rilate tertremojn, tektonan movadon k.s. Budapeŝto: Scienca Eldoneja Centro de UEA, 1983. Broŝ., proks. 300p. £4.30

Ĉu vi vidis jam la piedsignojn de l' profeto? Elem Janos. El la hungara tradukis Vilmos Benczik. Teatraĵo en du lingvoj - la hungara kaj Esperanto. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. Broŝ., 91p. £2.50

Ekspedicio Kon-Tiki Thor Heyerdahl. El la originalo tradukis Carston Brynildsen kaj prilaboris Stellan Engholm. Vigla, leginda raporto pri kvin viroj, kiuj transiris Pacifikan Oceanon per balsa flosilo. Stokholmo: Eldona Societo Esperanto, 1951. Bind., 209p. £4.00

La filoj de l' ŝtonkora homo Tiborcs Horváth. Bildrakonto, desegnis Pa Korcsmaro. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1978. Broŝ., 60p. £2.00

Forkaptita R.L. Stevenson. El la angla tradukis Albert Goodheir. Aventura rakonto de la 18a jarcento. Glasgovo: Kardo, 1976. Broŝ., 181p. £3.00

Georgo Dandin Molière. El la franca tradukis L.L. Zamenhof. Parizo: Hachette, 1908. Bind., 51p. £2.70

Humoroj William Auld. Poemoj verkitaj en Esperanto. La Laguna: Régulo/Stafeto, 1969. Broŝurita, 113p. £2.50

Lingvo stilo formo K. Kalocsay. Pri-Esperantaj eseoj. Budapeŝto: Literatura Mondo, 1931. Bind., 142p. £3.20

Malsata ŝtono Rabindranath Tagore. El la bengala tradukis L. Sinha. Malmo: Eldona Societo, 1961. Bind., 127p. £3.00

La mondo ne havas atendejon El la nederlanda tradukis F. Faulhaber. Pensiga teatraĵo en tri aktoj pri la konsekvencoj de la atombombo. Kontrolita de la Literatura Komitato. Parizo: SAT, 1951. Broŝ., 80p. £2.20

Neologisme Lorjak. Romaneto en sprita lingvaĵo. Helsinko: Fonduso Esperanto, 1982. Broŝ., 88p. £2.10

Nia historio H.A. de Hoog. Historio de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) de 1911 ĝis 1961. KELI, 1964. Bind., 159p. £2.20

La nova testamento Londono: Brita kaj Alilanda Biblio-Societo, 1982. Bind., 226p. Bonstata. £3.70

Paroladoj kaj poemoj L.L. Zamenhof. Dek paroladoj ĉe Universalaj Kongresoj de 1905 ĝis '12 plus famaj originalaj poemoj. Brazilo: KKE, 1963. Broŝ., 155p. £2.20

Patroj kaj filoj I.S. Turgenjev. El la rusa tradukis Kazimierz Bein (Kabe). Amsterdamo: FLE. Bind., 215p. £3.00

Plena vortaro de Esperanto kun suplemento E. Grosjean-Maupin k.a. Parizo: SAT. 1.) 1964 (7a eld.). Bindita. 2.) 1980 (9a eld.). Plasta kovrilo. Ĉiu 511 + 63p. po £4.20

Taglibro de Anne Frank (la Postdomo) El la nederlanda tradukis G.J. Degenkamp. Scheveningen: Heroldo, 1959. Bind., 219p. £3.90

La verda raketo Jean Forge. Satira novelaro el Esperantujo. Kopenhago: Eldonejo Koko, 1961. Bindita, 146p. £2.60

ŜEKSPIRO:

Epifanio aŭ 'Kiel vi volas' Tradukis William Auld. Glasgovo: Kardo, 1980. Broŝurita, 71p. £2.20

Rikardo tria Tradukis John Francis. Glasgovo: Kardo, 1980. Broŝurita, proks. 200p. £2.50

La tempesto Tradukis K. Kalocsay. La Laguna: Régulo/Stafeto, 1970. Broŝurita, 119p. £2.20

La tragedio de Otelo Tradukis Reto Rossetti. La Laguna: Régulo/Stafeto, 1960. Broŝurita, 202p. £2.50